

Ĉu vi kuiras ĉine?

Autore Johán Valano [Claude Piron]

Descrizione Appassionante romanzo poliziesco della serie "ĉu".

Editore IEM

Edizione Vieno, 1996

Pagine 136

Formato 23 cm

Illustrato No

Rilegato No

Prezzo € 14,00

Lingua Esperanto

Categoria Prosa originale

Supporto Libro

ISBN 3-901752-02-1

URL <http://katalogo.esperanto.it/katalogo/articolo.php?id=219>



Recensionii

Ĉu li verkis sufiĉe?

La originala prozo Esperanta havis relative fortan periodon en la 1930aj jaroj. Post la dua mondmilito ĝi tamen ne facile rekomenciĝis, precipe ne se temas pri la romanoj. Malmultaj verkoj aperis dum la jaroj 50aj kaj 60aj, kaj eĉ la komenco de la 70aj ŝajnis plene stagna. Sed en la dua duono de la 70aj jaroj io okazis. Du verkistaj pseŭdonimoj tiam ekliveris vicojn da romanoj leĝeraj, sen altaj pretendoj, krom se la celo distri jam estas pretendo sufiĉe alta. Ambaŭ estis franclingvanoj, la franco Lorjak (Jacques-Louis Mahé) kaj la belgo vivanta en Svislando Johán Valano (Claude Piron). Sub la nomo Johán Valano aperis inter 1976 kaj 1982 kvar krimromanoj en la ""Ĉu-serio"", krome aperis ankaŭ unu rakonto sub la nomo Johán Balano. Post ankoraŭ kvar jaroj aperis ankaŭ la novelaro Ĉu rakonti novele? kun similaj temoj kaj samaj rolantoj, sed ĝi ne estos pritraktata ĉi tie. La serio vekis grandan atenton kaj baldaŭ populariĝis, ne malplej inter iom pli junaj esperantistoj. Troviĝas multaj diversaj subĝenroj de krimromanoj, kaj ne facilas decidi, kiel klasi la Ĉu-librojn. Ĉiukaze ne temas pri romanoj kie realismo multe gravas. La aŭtoro kreis intrigon, kutime tre komplikan, kaj ni legante sekvas la ĉefrolulojn iom post iom malvolvi la fadenon kaj solvi la kazon. La intrigo plej ofte estas tre neverŝajna, sed bone funkcia ĝuste kiel krimromana intrigo, kaj tio ja estas ĝia fundamenta tasko. Se oni krome ŝatus sperti ion pri realaj okazaĵoj, lokoj, problemoj, oni prefere elektu verkon de alia aŭtoro, ekzemple Nemere aŭ Elgo. (Tamen ni memoru, ke kiam aperis Ĉu vi kuiras ĉine en 1976, neniu el ili ankoraŭ publikigis ion.) En la Ĉu-libroj ni ne trovas nin en la reala ĉiutaga mondo, sed kvazaŭ en ludo. La aferoj okazas en Sanktavallo, kie la homoj parolas variaĵon de Esperanto. Realaj lokoj aŭ landoj kutime ne estas menciataj, krom en Ĉu ni kunvenis vane, kiu okazas en vera medio. Priskriboj pri montoj, valoj, riveroj, urbetoj ne estas tre precizaj aŭ detalriĉaj, tamen pli-malpli direktas la pensojn al Svislando, kvankam ĉiuj nomoj estas aŭ Esperantaj, aŭ nenilingvaj. La protagonistoj estas triopo, kiuj kutime kune solvas la misterojn. Temas pri la polica detektivo Jano Karal, lia edzino la psikologo Ĝoja, kaj ŝia ĉiofara nevo Stefano. Ankaŭ ĉe tiuj figuroj esence mankas realismo - ili estas simple tri ludaj rolfiguroj kiujn la aŭtoro vigle movas kaj interagigas por peli la rakonton antaŭen. La geedzoj Karal eĉ fojfoje riskas tedi pro sia troa geedza feliĉo kaj ĝenerala saĝeco. Ili certgrade similas geprincojn de fabelo - oni ne povas imagi ilin viziti necesejon, kvereli aŭ amori. Kiel konate, homoj perfektaj ne ĉiam vekas simpatian. Pli amuza estas Stefano, kvankam ankaŭ liaj moketoj al la parencoj ofte ŝajnas iom tro senenhavaj. Malgraŭ tio, tediĝo normale ne minacas la leganton de la Ĉu-libroj. Ilia ĉefa valoro estas la vigla kaj energia rakontado kaj la lerte plektita intrigo, kies solvon oni avidas trovi. Ne multe indas mem klopodi solvi la kazojn - almenaŭ ĉi leganto tute fiaskis pri tio. La manko de realismo kaj nuancoj signifas, ke la verkoj ne profunde tuŝas nin, sed kompanse ili havas leĝeron kaj spriton kiu permesas al ni pasigi kelkajn horojn sen enui, sen incitiĝi aŭ ekscitiĝi. Jen sendube la ĉefa kaŭzo, kial ĉi libroj tiel populariĝis. Se la tri ĉefroluloj iom ŝablonas, tamen oni ne povas ĉiam plendi pri nekredindaj personoj en la verkoj. Male, jen kaj jen aperas figuro interesa kaj kun sufiĉe lerte priskribita psikologio: Konstanta impreso, forta sed erara, ke ŝi ne estas ameblo, malfaciligis al Lizabeta la homajn rilatojn, precipe se iom intimaj, tiel ke ŝi emis rifuĝi en solecon: kiel sekretariino, ŝi toleris nur postenojn, en kiuj ŝi disponis propran oficejon kaj povis grandparte organizi mem sian laboron; kiel sportemulino, ŝia prefero iris al longaj solecaj montekskursoj, al skiado kaj al naĝado en lokoj senhomaj. Ĉar ŝi tamen sopiris al homa komprenemo, ŝi vizitadis klubojn pli malpli strangulajn, kie ŝi neniam trovis la profundajn amikecojn, kiujn ŝi deziris havi, sed kiuj ŝin ankaŭ timigis. Ŝia bezono esti amata igis ŝin fari por la aliaj, kaj ankaŭ por la societoj, en kies vivo ŝi partoprenis, la plej malagrablajn taskojn, kiujn ŝi plenumis kun pedanta perfekteco. Sed tio altiris al ŝi pli da kompatado ol da amo, kio malfeliĉigis ŝin. (Ĉu li venis trakosme, p. 88) Sed estas tipa trajto de la verkoj, ke tia klarvida portreto aperas en priskriba formo. La aŭtoro povas rakonti ĉi tion al ni, sed li ŝajne ne disponas pri literaturaj rimedoj por montri aŭ scenigi ion similan, kiu ebligus al la leganto konkludi pri la karaktero de la persono. Tion oni vidas eble plej klare en la dialogoj, kiuj malofte impresas nature. Ekzemple la ĵus priskribita virino povas diri pri si mem: ""Mi agis saĝe dum mia tuta vivo,"" ŝi daŭrigis. ""Mi tute ne havas brilan intelekton. Mia inteligenteco eble eĉ situas iom sub la meza nivelo. Sed mi ĉiam havis sanan prudenton, kaj mi estas ĝenerale fidinda, serioza en mia laboro."" (Ĉu li venis trakosme, p. 133) Ne facilus imagi realan homon tiel prezenti sin! Efektive ankaŭ ĉi tio estas tipa aŭtoro priskribo pri la virino, trudita en ŝian propran buŝon! Kaj jen alia ekzemplo; parolas juna laboristo al sia amatino dum kaŝa privata interparolo: ""Apogu vin sur mi, kara, kiel antaŭe,"" diris ĉi-lasto. ""Nenio funde ŝanĝiĝis, nur supraĵe. Konsentite, mi ne sentas min perfekte komforte. Sed nur pripensu mian situacion. Eble troviĝas iu murdema en la garaĝo!"" (Ĉu li bremsis sufiĉe, p. 42) Kaj jen parolas albana ""gastlaboristo"", vivanta de kelkaj jaroj en Sanktavallo: ""Se iu enbarakiĝas piedpinte je la dua matene, tenante la ŝuojn en la mano por ne brui, lia kata moviĝo resonigas la tutan konstruaĵon ĝis la lasta ĉambro. Kaj se vi aŭskultas transistoron aŭ volas kanti aŭ ludi muzikon dum pluvas ekstere, kion vi fakte bezonas por iom malstreĉi vin post plena tago da minaj-elfoso, ĉu ne?, vi partoprenigas la tutan loĝantaron en via koncerto!"" (Ĉu li bremsis sufiĉe, p. 69) Ne eblas diri, ke tiuj diraĵoj portas koloron el la reala vivo! Male, ili portas fortan stampon de la aŭtoro voĉo. Kelkfoje la sento, ke ne temas pri realsimilaj agoj kaj diroj, sed pri partopreno en ludo, ŝajnas eĉ trafi la aŭtoron, kaj li fakte enkondukas ""ludon"" en la eventojn, kun iom diskutibla rezulto. Jen ekz. geedza dialogo en la Karal'a hejmo: ""Via talento suspekti ĉiun min timigas. Espereble vi ne suspektas min."" ""Vin? Donu al mi unu minuton, kaj mi trovos. Ĝenas la fakto, ke vi ne konis lin. Sed eble vi lin konis..."" ""Tamen, sen motivo..."" ""Vi, sen motivo? Vi estas psikologino, ĉu ne? Eble vi dezirus science analizi tion, kion travivas murdanto. Kaj mi ne estas apolone bela. Eble vi renkontis Paŭlon, kaj lia beleco naskis en vi sentojn, kiuj vin timigas, ĉar vi deziras resti fidela. Por forigi la tenton, oni forigas la tentanton..."" ""Jano! Kia sadisma imago! Kiel vi povas...?"" Ŝi sciis, ke estas nur ludo, kaj tamen io prokuraĵ timis en ĉi. Li tiam sentis kaj tui agis kuraco: pasio li ĉin kiris. (Ĉu vi kuiras ĉine, p. 47)